

Charles Ecabert : *Patro Gregoro Girard, 3-a parto*
Claude Gacond, 229-a radioprelego, 1968.02.28 & 03.02

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

A.- Vi aŭdas prelegaron de Charles Ecabert pri la svisa edukisto Patro Gregoro Girard.

Cl.- « Patro Girard estis tiel bone dotita per naturo, ke unu lia amiko, kanoniko Fontaine, lin nomas « *universala homo* ». Fakte Patro Gregoro Girard plenumis plurajn taskojn ege gravajn, ĉu en la ordeno kiel **gardisto** aŭ provincestro, ĉu en la Helvetia Respubliko kiel katolika paroĥestro en Berno, ĉu en Friburgo, lia naskiĝurbo, kie oni eĉ dufoje intencis proponi lin kiel episkopon. Ĉio tio sufiĉe evidentigas la superajn virtojn kaj kvalitojn de homo, pri kiu François Naville, lia amiko, skribis en eta biografio :

A.- « *Estus malfacile imagi homon, kies naturo pli komplete harmonias kun lia tasko.* »

Cl.- Sed lia vera vojo kaj vokiĝo estis tiu de la edukado kaj dum 20 jaroj, de 1803 ĝis 1823, li dediĉis sin senkalkule al la reformo kaj organizo de la friburgaj lernejoj.

A.- En 1803 la Eduka Ĉambro, konstatinte la malmultan fervoron de kelkaj instruistoj kaj la nekapablecon de la aliaj, decidis, ke estu funde ŝanĝita la malbona organizo de la klasoj kaj de la instruantaro. Oni komisiis la franclingvajn lernejojn al la Patroj Kordeliero kaj la germanlingvaj al la Patroj Aŭgustinoj. Tial Patro Girard iĝis direktoro de la unuagrada lernejo, kaj, tiele, homo kiu estus kapablinta okupi la plej altrangajn oficojn, li humile servis la komunan utilon kiel edukisto.

A.- « *Sed tio, skribis la historiisto Veuthey, estis permesonta al la friburga pedagogo plene disvolvi siajn kapablojn kaj doti sian naskiĝan urbon per institucio, kiu ĝin estis famigonta en la tuta civilizita mondo.* »

Cl.- Patro Gregoro ne eniris la karieron kun jam perfektaj scienco kaj principoj nur aplikendaj. Tute ne ! Lia pedagogia scienco fluos el la sperto kaj la principoj eliros el la ĉiutaga praktiko. Antaŭ ĉio li posedis, laŭ la esprimo de la amiko Naville :

A.- « *tiun inteligentecon je la servo de la koro, tiun amon de la homaro nutratan per la Di-amo, kiuj estas kondiĉoj de sukceso en ĉiuj sindonemaj entreprenoj.* »

Cl.- Baza principo de Patro Girard estas, ke oni elirigu instruon el la rutinaj voj-sulkaj, laŭ kiuj ĝi per tradicio sin pene kaj peze trenis kaj igu ĝin alloga kaj ĝojiga. Li deklaras en 1812 :

A.- « *Ni klopodas forigi mortintajn formojn kaj diskonigi viklecon al ĉiuj lecionoj. Nia principo estas kreigi al la infanoj tion, kion ili devas lerni : tiel oni vekas iliajn kapablojn kaj de tie rezultas tiu gusto kaj bezono pri laboro, kiun ni tiel deziras doni al la junularo.* »

Cl.- Kreigi al la lernanto : jen la ĉefa sokrateca principo pri mensa kulturo. Girard rapide eltrovas la metod-principon, kiu funde ŝanĝos la lingvan kaj natursciencan instruojn, funde aliigante la koncepton mem pri edukado. Oni nur bone scipovas, kion oni eltrovis mem, ĉar scienco estas persona rekreo. Inteligenteco pligrandiĝas kaj kreskas, laŭ kiel ĝi kreas, serĉas, elpensas. Ago regas intelekton samkiel koron kaj volon. Dank'al siaj reformprincipoj Patro Girard reviviglas la lernejojn, kiu antaŭnelonge kontentiĝis nur per aŭtomata ripetado de la alfabetaj kaj de la kateĥismaj libroj. La prilerneja komisiono konstatas en 1812 :

A.- « *Sub Patro Girard la franclingvaj klasoj povas utili kiel modelo el la plej bonaj tiuspecaj edukejoj.* »

Cl.- Dure devis tamen batali Patro Girard kontraŭ la reakcia registaro, kiu, post la falo de Napoleono, reprenis la regadon en 1814. Sur la eduka kaj socia kampoj du konceptoj pri homo kaj socio kontraŭstaris unu la alian : spirito de blinda kaj timema cedo, spirito de libera

kaj klarvidanta oboe. Girard komprenas la direkton de la socia evoluo en sia tempo, la neceson doni al homo pere de la edukado personan formadon lin kapabligantan uzi, anstataŭ misuzi, liberon. Ĉar libero sen eduko de konscienco fatale finvenas al anarĥio. Respondante al mallaŭdantoj kaj obstaklantoj dum publika premi-distribua ceremonio, li indignas kaj eksplodas :

A.- « *Se estas malbone lumigi junularon, la estraro devas ekde nun renversi ĉiujn katedrojn, fermi la lernejojn, bruligi la librojn kaj, anstataŭ meti la parolon sur la lipojn de sia amegata infano, patrino devas lin kondamni al silento kaj besta stulteco... Predikistoj pri mallumo, pledu kontraŭ la aŭtoro de la naturo, ĉar estas evidente, ke li donis al ni inteligentecon por kapti veron, orelojn por ĝin aŭdi, parolon por ĝin komuniki.* »

Cl.- Kaj fine li aldonas :

A.- « *Pardonu, sinjoroj, tiun malpaciencaĵon de animo, kiu profunde sentas la valoron de instruado kaj ne estas indiferenta pri la bono de la homaro.* »

Cl.- Kelkjarojn poste li pliprecizigas sian penson dirante :

A.- « *La instruisto sin turnu al la sento, kiu sola kortuŝas kaj agigas. Nur per tiu vojo ni povas aliri la koron. Ĝenerala regulo estas, ke ni agas, kiel ni amas, amas kiel ni sentas, sentas kiel ni pensas.* »

Cl.- Tiu formulo plurfoje renkontiĝas en liaj skribaĵoj kaj klare resumas lian pedagogian psikologion. »

A.- Vi aŭdis prelegon de Charles Ecabert.

Cl.- Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-